

# Laŭokaza Novaĵletero.

Organo de la

Internacia  
Komerca kaj Ekonomia  
Fakgrupo.

P.O. Kesto 25041,  
3001HA Rotterdam,  
Nederlando.

Numero 11;

IKEF  
★  
1984

aprilo, 1986.

Formala alvoko partopreni en

Perpoŝta referendumo de la Membraro,

Post diskuto de la eblecoj, la Estraro decidis ne provi okazigi Ĝeneralan Kunvenon de la Membraro, en la kadro de la 71-a Universala Kongreso de Esperanto, en Pekino, Ĉinio, fine de julio, 1986.

Tion la Estraro bedaŭras, ĉar lastatempe evidentiĝis, ke la nivelo de aktiveco inter niaj membroj pli kaj pli altiĝas, kaj estas konate, ke la plej bona metodo akceligi kaj kanalizati tiajn entuziasmojn estas ebligi perbuŝan diskuton de ĉiuj ideoj. Sed tion mal multe da niaj Membroj sinanoncis por partopreni en la U.K., ke estas tre duba afero, ĉu sufiĉe partoprenus Ĝeneralan Kunvenon por efektive pritrakti la necesajn formalajojn.

Anstataŭe, kaj konforme al artikolo 7.4 de nia Statuto, ni organizas ĉi-jare Perpoŝtan Referendumon, (kontrolu en PV, je paĝo 402), kaj via Estraro urĝe petas vin ĉiujn dediĉi la mallongan tempon necesan por partopreni en ĝi.

Plena 'tagordo' por la referendumo troviĝas je paĝo 2 de tiu ĉi Novaĵletero. Tie ĉi ni atentigas vin ĉiujn, ke por partopreni en la referendumo necesas, ke vi sendu skribitan reagon. Nur tio! Sed atentu ankaŭ pri tio ĉi, nia Estraro petas, ke la poŝtstampo sur la koverto de (skribita) reago enhavas daton plej lastan je la 31-a de majo.

Via Estraro, kompreneble, ŝatus ekkoni viajn laŭdojn pri la mast-rumado de aferoj dum la ĵusfinita jaro, sed eble por iuj inter vi pli grava estas la ebleco esprimi opinion kontraŭan. Tiam opinion esprimu!

Kiel priskribita en la Statuto, se simpla plimulto de la Membroj sciigas sian malaprobos, tiam la Estrara Raporto estas rifuzita. En alia kazo, la Estrara Raporto aŭtomate akiras aprobon. Sed agnosko de ebla kontraŭstaro povus esti grava al iu Membro; ni certigas publikigon de iuj kaj ĉiuj kontraŭaj reagoj.

Ne-formala kunsido de IKEF okazos dum la Universala Kongreso. (Detaloj pri la dato kaj horo troviĝos en la Kongres Libro.)

La kunsido okazos sub la prezido de nia Prezidanto, S-ro Franz Braun, kaj kun li D-ro Werner Bormann ĉeestos por roli kiel anstataŭanto de Estrarano.

Iuj aliaj Membroj kiuj ĉeestos havos la rajton paroli kaj proponi ideojn, sed la ĉefa celo de la kunveno estos disdoni informojn pri IKEF, kaj respondi demandojn aŭ/kaj komentojn de ne-membroj. Pro tiu ĉefa celo, la aktiva subteno de ĉiuj ĉeestantaj Membroj estos aparte bonvena.

La Estraro.



Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo.

*La Estraro:*

S-ro Franz J. Braun, *Prezidanto;*

D-ro Marco Picasso,

S-ro François-Xavier Gilbert;

D-ro István Gether;

S-ro L. Mee, *Ĝenerala Sekretario.*

*Revizoro por la financa raporto:*

D-ro Giancarlo Polerani.

Centra sidejo:

p/a Mondk. Eld. Esperantista,  
van Heusdestraat 88 B,  
3023 RX Rotterdam 6,  
Nederlando.

tel.: (..) 31 10 425 46 25  
(enlande: 010 - 425 46 25)

PERPOŝTA REFERENDUMO, 1986.

1. La Estraro prezentas sian raporton por la jaro 1985, kaj proponas akcepton de tiu raporto;
2. La Estraro prezentas la Financan Raporton por la jaro 1985, notante, ke la ciferoj de la raporto estis prezentitaj en bona tempo al la kontrolo de la Revizoro, kaj proponas akcepton de tiu raporto;
- 3.a La Estraro notas la sumon de la financa deficito, kaj proponas likvidon de tiu deficito per eluzo de parto de la kapitalo;  
b Notante la sumon de la deficito, la Estraro tamen atentigas, ke adekvata kapitalo restas por subteni mastrumadon dum almenaŭ unu plia jaro sen ŝanĝo en la nivelo de membro-kotizoj, kaj tial ne faras rekomendon pri plialtigo de la membro-kotizoj;
- 4.a S-ro F.J. Braun kaj D-ro M. Picasso demisias siajn lokojn, post unu-jara oficperiodo. La ceteraj Estraranoj proponas, ke ambaŭ S-ro Braun kaj D-ro Picasso estu re-elektitaj al la Estraro, por du-jara oficperiodo ekde la komenco de julio, 1986;  
b La Estraro bedaŭras, ke neniu alia nomo estas proponita por elekto al la Estraro;
5. La Estraro esprimas la dankojn de la membraro al la honorofica Ĝenerala Sekretario, pro jaro de sindonema kaj efika laboro.

en la nomo de la Estraro,  
Lawrence Mee,  
Ĝenerala Sekretario.

Rotterdam,  
1986-03-31.



## • Estrara Raporto por 1985 •

Nia membraro duobligis dum la jaro, sed ĉar la komenca cifero estis nur 16 membroj, ni ankoraŭ, je la fino de la jaro, estas malforta asocio. Frue en la jaro ni starigis varbkampanjon per reklamanoncoj, kaj akiris novajn membrojn. Sed malgraŭ tiu kampanjo, la granda 'salto' en la nombro estas sekvo de sukcesa Fondkunveno en la kadro de la Univasala Kongreso en Aŭgsburgo. Alia sekvo de tiu Fondkunveno estis relative multaj mencioj en la E.-gazetaro.

La Fondkunveno akceptis, kun kelkaj kondiĉoj, la Statuto-n proponitan kune de Ĝenerala Sekretario kaj la Prezidanto; kaj tiam, tiu ago, la Fakgrupo akiris kvazaŭ ŝanĝan ekzistorajton. Ellaborenda ankoraŭ estas ĝenerala regularo, por organizi labormetodojn, kaj tiel plu.

Dum la Fondkunveno elektiĝis baza regularo por la Fakgrupo, kaj tuj ekde tiam tiu Estraro komencis komunan laboron. Ĉiu diskuto okazas perpoŝte, kaj tio postulas sufiĉe longan tempodaŭron, sed tiu baza sistemo ĝis nun kapablas pritrakti la punktojn diskutendajn. Tute interŝanĝiĝis kaj estis traktataj aferoj de la Estraro tiel-nomataj Diskutperoj, n-roj 8501 - 8509, pri naŭ temoj de la Fondkunveno ĝis la jarfino. Tri el ili estis findeciditaj; pri la aliaj la diskuto pludaŭros en la nova jaro. Ĉiuj estraraj decidoj ni raportos ekde 1986 sub aparta rubriko en nia Novaĵletero. Tiu nia komunikilo, la 'Laŭokaza Novaĵletero', akurate aperis ses-foje dum la jaro.

Sekve de du iniciatoj de la Estraro, la Fakgrupo eniris la kampon de reklamperado. S-ro Braun sekvis sian proprajn konsilojn, (Novaĵletero 5), kaj sukcesis varbi reklamanoncojn por revuo MONATO; laŭ proponita aranĝo, la eldonado de MONATO aranĝis pagojn de kurtaĝoj al nia kaso. La Estraro varme btenas tian varbagadon, kaj ĝin subtenus eĉ se la kurtaĝoj ne venus al nia kaso, pro evidentaj avantaĝoj por la -Movado. (Menciinda ankaŭ estas, ke en la jaro, kvin fakaj artikoloj aperis en MONATO, laŭ iniciatoj de IKEF.)

La alia iniciato estas tio de D-ro Casso, kiu proponis la metodon uzadon de via propra organo por reklamanoncoj kaj anoncetoj; ankaŭ li sekvis

propran konsilon kaj varbis pagendan anoncon, favore al nia kaso.

Iniciato de alia speco venis de S-ro Gilbert, kiu akceptigis la ideon Esperantigi parton de informbroŝuro, publikigitan en la printempo de 1986 de Komerca Ĉambro. Traduklaboron S-ro Gilbert transdonis al la Fakgrupo, kaj li poste certigis, ke nia kaso ricevis pagon pro la servo.

La Ĝenerala Sekretario dediĉis multajn horojn al korespondado kun, ĉefe, membreco-kandidatoj. Estas evidente, ke nia Fakgrupo vekis grandan intereson en multaj landoj, sed, bedaŭrinde, plejparte la reagoj venis el landoj kiuj ne havas, pro unu aŭ alia kialo, ian eblecon ebligigi pagojn de kotizoj al ni. Kaj en la muna relative malforta stato de nia kaso, ni ne povas akcepti membrojn sen samtempa kontribuo al niaj enspezoj. Ni daŭre donas atenton al tiu ĉi dilemo, aparte pro tio, ke nia agadplano antaŭvidas aktivan subtenadon por la malfortaj landoj de la 'tria mondo'.

La Fakgrupo nun havas respektindan Bibliotekon, danke al donacoj de pluraj membroj. Ĉiu ricevo de libro aŭ alia eldonaĵo ricevas mension en Novaĵletero, sed jarfina raporto estas taŭga loko ripeti niajn dankojn. Ligita kun la Biblioteko estas niaj paŝoj al starigo de aktiva terminologia laboro, konforme al nia agadplano. Ankoraŭ je la jarfino tiu laboro ne efektive komenciĝis, sed pluraj bazaj paŝoj estas ja faritaj.

Pripensindaj ankoraŭ estas pluraj ideoj pri eksteraj rilatoj, ĉefe pri proponita aliĝo al UEA kiel kunlaboranta fakasocio. La ĝisjarfina sinteno estas, ke tiaj paŝoj devas atendi ankoraŭ pli grandigon de la membraro.

Dum la Jarkunveno en 1986, (aŭ, kiel ŝajnas pli probable, dum la 'perpoŝta referendumo de la membraro'), du el la kvin Estraranoj formale demisios sian lokon, sed ambaŭ estas pretaj akcepti re-elektiĝon. Nia espero restas trovi kromajn membrojn por la Estraro; laŭ la Statuto, ni rajtas elekti du pliajn Estraranojn.

Nome de la Estraro,

Rotterdam,  
1986-02-11

Lawrence Mee,  
Ĝenerala Sekretario.



## Jarfina financa raporto.

Dum la plej granda parto de la jaro, financa situacio en la Fakgrupo estis malstabila; jam je la jarkomenciĝo, asocia kapitalo estis efektive negat-  
 a, kaj ĝi daŭre estis tiel ĝis, en la  
 laj tagoj de la jaro, ni ricevis tre  
 avaran donacon de membro kiu volas  
 esti ne-nomita. La prognozo por la  
 ksima jaro estas nun pli hela.

La financaj rezultoj pri la oficiala  
 adkunveno montras netan koston, (en la  
 de iom pli ol cent guldenoj), sed  
 la konstato devas esti, ke la memb-  
 ro tre malavare donacis monon por ebl-  
 la okazigon de tiu 'evento', kaj pro  
 malavareco ni grande ĝojas.

Donacoj venis ankaŭ en aliaj formoj,  
 kurtagoj pro varbado de reklamanonc-  
 venis al nia kaso, kaj 'komerca' pago

pro traduklaboro farita venis ankaŭ rekte  
 al la Fakgrupo. Pro ĉiuj tiaj kaj aliaj  
 donacoj ni esprimu sincerajn dankojn.

Sed tamen necesas pripensi, ĉu ni ne  
 devas plialtigi la jarkotizon! La ĉi-  
 kuna Spezokonto montras, ke la ricevitaj  
 membro-kotizoj ne sukcesis kovri la kost-  
 ojn de nia (modesteta) Novaĵletero.

Denove ni devas fronti la neceson iel  
 plialtigi la enspezojn, kaj se ni ne  
 sukcesos varbi pliajn membrojn, ni ne  
 havos alian elekton ol plialtigi la jar-  
 kotizon por la nunaj membroj; ne decas,  
 ke ni efektive dependu je la alveno de  
 donacoj por pluekzisti.

La ĉi-kunaj Spezokonto kaj Bilanco  
 ricevis la aprobon de D-ro Polerani, la  
 honorofica Revizoro, kiu ricevis kontent-  
 igajn respondojn al ĉiuj demandoj.

Rotterdam,  
 1986-02-08.

Lawrence Mee,  
 Generala Sekretario.

### SPEZOKONTO por la plena jaro, 1985. Ĉiuj sumoj estas en guldenoj.

(1984)	<u>Kostoj</u>	(1984)	<u>Rimedoj</u>
48	Generalaj kostoj, inkl. de deprezoj 9277 124	160	Membro-kotizoj 555 10 190
73	Kostoj - materialoj 2056 112	146	Donacoj kaj krompagoj 292 536.1
284	" - Novaĵleteroj 4110.8 605	10	Gajno pro peradvendoj -
137	" - afranko, ktp 464.5 253	-	Enspezoj pro reklam- anonco-kurtagoj 138 2.534
-	" - informado, ktp 820.7 447	-	Enspezoj pro profes- iaj servoj 150 2.754
-	Kostoj de Fondkunveno 947.4 516	-	Donacoj pro Fondkunveno 397 748.9
		226	MALGAJNO por la jaro 525 963.9
542	sumo de la kostoj 3276.7 2 057	542	sumo de la rimedoj 2 057 gld.
-----	-----	-----	-----

### BILANCO je 1985 - 12 - 31. Ĉiuj sumoj estas en guldenoj.

(1984)	<u>Aktivo</u>	(1984)	<u>Pasivo</u>
215	Starigaj kostoj, nete de deprezoj 2368 129	180	Kotizoj antaŭpagitaj 459 848.7
27	Biblioteko de la Fakgrupo 97.3 53	-	Kapitalo pro Dumvivaj Membroj 380 697.7
-	Suldanto: Mndk.Eld.Esp'ista 1 252	-	Subtena Fondaĵo 40 73.4
		205	Antaŭricevita enspezo 10 18.4
			Kreditoroj: F-lino Ahmad-Nia 10 18.4
			S-ro T.S. Lee 15 27.5
		83	Asocia kapitalo 1 045 1918.6
		(226)	(MALGAJNO) por la ĵusfinita jaro (525) 963.9
242	aktivo-sumo 2632.2 1 434	242	pasivo-sumo 1 434 gld.
-----	-----	-----	-----



INTERKONATIĜO

Kun plezuro ni bonvenigas novajn membrojn al nia Membro-listo.

Tiu ĉi listo havas apartan intereson, ĉar per ĝi ni rekonas enkondukon de nia organizaĵo en du por-ni-novajn landojn. Kaj krome, ke almenaŭ du el la novaj Membroj estas junaj personoj je

frua ŝtupo de kariero; la estonteco de nia Fakgrupo pli heligas pro tiu promeso, ke junaj manoj baldaŭ pretos akcepti respondecajn rolojn.

Kiel kutime, ni petas atentigon pri iuj eraroj de detaloj en la listo.

Membro-listo je 1986 - 03 - 31.

- 35 Taleski, S-ro Sotir, referanto pri eksporto-importo kaj devizaferoj;  
ul. 'Oslo' br. 12, 91 000 Skopje, Jugoslavio;
- 36 Lee, S-ro Jung-Kee, direktoro pri administrado, kaj redaktoro;  
C.P.O..Kesto 3047, Seulo, Seoul, Suda-Koreio;
- 37 Lim, S-ro Jung-Ho, entreprenestro, eksporta kaj importa komerco;  
C.P.O. Kesto 3047, Seulo, Seoul, Suda-Koreio;
- 38 Deseure, S-ro Hans, studento de ekonomiko;  
Woluweveld 19, 1940 Zaventem, Belgio.

*Niaj mecenatoj.*

*La Subtena Fondaĵo de IKEF.*

Ni esprimas apartajn dankojn al Membroj kiuj faris kroman pagon, aŭ por donaci sumon al la ĝenerala kaso, aŭ por la Subtena Fondaĵo.

Dankon! al:

S-roj Gilperez, Mee, Wiersch, Bormann, Schneider kaj T.S. Lee.

Kandidatoj por membreco, kiuj estas tamen malhelpataj aliĝi pro ne-ebleco transpigi la kotizosumon, sinanoncas al ni el pluraj landoj. Ni havas fondaĵon celitan helpi precize tiaj kazoj, sed provizore tiu kaso estas malplena. Re-plenigo dependas je donacoj de vi niaj jamaj membroj. Se eblas al vi, nepre pripensunian bezonon de tiaj donacoj.

Anticipan dankon!



## RECENZO.

## Gratulinda iniciato.

'Repertoire des produits industriels de la Meuse', speciala numero de 'Meuse Economique', la ekonomia magazino de la Komerca kaj Industria Ĉambro de la Mozo, (Meuse); Bar-le-Duc, Francio; januaro, 1986. 92 paĝoj; 30cm.

Konstatinte, ke la ekonomia vigleco kaj industria iniciatemo de la entreprenistoj de sia regiono estas ne sufiĉe vaste konataj, la Komerca kaj Industria Ĉambro de Mozo, Francio, decidis prezenti ĉiurlingve la tutan repertuaron de sia regiono, per detale verkita informilo.

La rezulto estas 92-paĝa, ampleksa indekso de la komercaj kaj industriaj eblecoj de la regiono. La buntaj kovriloj el fortika glatbrila papero trafas plaĉe la okulojn, kaj lukse prezentigas al la manoj. La enhavo estas klare kaj okulplaĉe presita, nigre kaj verde, sur bonkvalita blanka papero.

La informoj pri la 195 entreprenoj aperas nur en la franca lingvo, sed informoj pri kiel uzi la indekson, kaj la listoj de produktaĵoj kaj agadkampoj de la francaj entreprenoj, prezentigas en kvar lingvoj: la franca, la germana, la angla kaj Esperanto.

Aldone al la listoj aperas mallongaj elĉerpaĵoj el alia franca eldonaĵo de la regiono, pri la historio, transport-retoj kaj naturo de Mozo, en la angla kaj germana lingvoj, kaj tutpaĝa originala artikolo en Esperanto pri franca specialaĵo de Bar-le-Duc, (pr.: barleduk), 'ribojelo'.

La indekso konsistas el kvar partoj: laŭalfabetaj listoj de produktaĵoj; - listo de entreprenoj dividitaj laŭ agadkampoj; - laŭalfabeta listo de la mozaj entreprenoj prezentataj, kaj - kvardek naŭ paĝoj da detalaj informoj pri tiuj entreprenoj.

La unuaj du listoj aperas en kvar lingvoj; la lastaj du aperas nur en la franca. La unulingveco de la lasta listo neniel povas ĝeni alilingvanojn, ĉar ĉiu produktaĵo, ĉiu agadkampo menciitaj en tiu listo troviĝas en la unua sekcio kune kun traduko en la aliaj tri lingvoj.

Sur la unua paĝo de la franca, la germana kaj la angla listoj, Esperanto estas klarigita piednote per citaĵo el

franca enciklopedio, 'Quid', (pr.: kŭid). Sur la unua paĝo de la Esperanta listo, piednote anoncas, ke ĉi listo estas farita iniciate de IKEF.

Rilate al la lingvaĵo de la magazino, estas interese, ke la anglaj tekstoj plenplenas je eraroj ne nur preskoldfaritaj; ĉar la fonto de la germanaj tekstoj estas la sama kiel por la anglaj, eble ankaŭ tiuj plenplenas je lingvaj misaĵoj. En la tutpaĝa Esperanta teksto, originale verkita de Sinjorino Y. Brion, troviĝas nur unu eraro, ('kvardek-kvin' anstataŭ 'kvardek kvin'), kvar preseraroj kaj tri lingvaj dubindaĵoj.

En la listoj de produktaĵoj, la angla lingva nomaro enhavas plurajn erarojn kaj dubindaĵojn. Ankaŭ en la Esperantan liston enŝteliĝis kelkaj preseraroj, ĉefe rilate al supersignoj, kaj kelkaj lingvo-malgustaĵoj. Ekzemple: 'premadadapt-aĵo' devus esti 'premadadaptado', (la franca 'emboutissage' signifas agon, ne aĵon); 'izoligado' kaj 'izoligtabuloj' devus esti reciproke 'izolado' kaj 'izol-tabuloj', ('izoli' estas transitiva verbo). Demandsignon mi metas ĉe kelkaj aliaj tradukaĵoj. Ekzemple: kial ne 'kalsonetoj' aŭ 'kalsonoj' por la franca 'caleçons', anstataŭ la ĝenerala 'subvestaĵoj'? Ĉu la tradukinto ekhentis rekte nomi tiun intiman vestaĵon? Kaj 'urba lumigado' ŝajnas al mi tro limiga esprimo por 'éclairage public', sed povas esti, ke la franca esprimo ĉiam rilatas nur al enurba lumigado. Kiel, ekzemple, 'buĉoviando' diferencas de aliaj viandoj? Kial ne uzi 'kromproduktaĵoj' por la angla 'by-products', anstataŭ 'similaĵoj'?; 'fer-erco' anstataŭ 'fer-minaĵoj'?; 'ŝpaloj' anstataŭ 'transtraboj' por la 'traverses de chemin de fer'?

Tamen, mi evitu pedantumi: tradukitan liston en nian ankoraŭ florantan kaj maturiĝantan lingvon estis heroa tasko postulanta horojn da cerbumado. Volonte mi gratulas kaj la tradukinto(j)n kaj la iniciatinton de la Esperanta enhavo de la broŝuro.

Akiru ĝin! per peto al: La Komercaj Industri-Ĉambro de la Departemento Meuse, Parc Bradfer, 55000 Bar-le-Duc, Francio.

Montru ĝin al viaj gekolegoj; instigu interesitojn reagi al ĝia enhavo, prefere profite al la departemento, kies reprezentanta organizaĵo iniciatis la eldonon.

Audrey C.E. Childs-Mee.



## PRELEGVOJAĜO.

Burokratismo estas veneno por  
la ekonomio.

Dum marto ĵuspasinta, nia Estrarano, D-ro István Gether, el Budapeŝto en Hungario, faris, sekve de aranĝoj faritaj de nia Prezidanto, S-ro F.J. Braun, prelegvojaĝon tra Okcidenta-Germanio. Al dek apartaj lokaj E.-grupoj, en dek diversaj urboj, de Munkeno en la sudo ĝis Bremeno en la nordo, D-ro Gether faris ilustritan prelegon laŭ la temo, La hungara ekonomio en 1966-a jaro.

La prelegvojaĝo vekis plurajn efikojn en kaj ĵurnaloj; ĉie estis intereso en la ideo, ke faksperta hungaro pretas prelegi pri la situacio en propra lando.

Ni estas bonŝancaj en tio, ke traduko de raporto en unu el tiuj ĵurnaloj venis al ni, cele al diskonigo al niaj membroj de la ĉefaj punktoj preparolitaj. Jen, iomete parafrazita, estas tiu traduko de raporto en 'Acher-Rench-Zeitung', de la urbo Oberkirch. Ni uzas (tradukon de) la titolo donita al la raporto.

" En la kunvensalono de loka banko en Oberkirch, D-ro István Gether, hungara ekonomikisto el Budapeŝto, faris prelegon pri la temo, La hungara ekonomio, 1966.

S-ro Franz Braun, Prezidanto de la Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo, enkondukis la preleganton al la ĉeestantaro, kaj priskribis liajn meritojn en la ekonomika kampo.

Por enkonduki la prelegon, D-ro Gether montris filmon pri sia lando, sed prikommentis pri ĝi, ke rigardi reklamfilmon tiel tiu ne tre efikas por doni informojn pri la ekonomiaj cirkonstancoj de la lando.

Kiel en aliaj socialismaj landoj ankaŭ en Hungario, 1945 estis la jaro de enkonduko kiel idealo de la soveta ekonomisistemo kaj la soveta politiko. Kaj tiel la ŝtata proprieto konsistigas la ekonomian formon de la socialisma proprieto. Ĝis meze de la sesdekaj jaroj, la ekonomia kresko estis sufiĉe kontentiga. Je tiu tempo estis enkondukita la nocio de 'intereso', kiun havu laboristoj kaj oficistoj por labori pli precize, por ke finfine la tuta popolekonomio spertu novan ekfloradon. La ekonomidirektismo, tiam novspeca, estis enkondukita en 1968.

En la fruaj sesdekaj jaroj, entreprenoj estis kunigataj far la ŝtataadministrado; kaj oni kreis per tio mamutentreprenojn eĉ en kampoj, kie tio kontraŭas al la karaktero de la ekonomio. Per postaj reformoj, la ekonomia kresko denove akceliĝis; la ekonomio pli malfermiĝis, kaj la mankoj videbliĝis.

Komence de la okdekaj jaroj, oni pli ofte sentis la bezonon direkti la ekonomion al aliaj prosperaj kampoj.

D-ro Gether vidigis la problemojn kaj malfacilaĵojn, kontraŭ kiuj oni devas batali. Malgraŭ la pli fruaj reformoj, la funkciado de la ekonomio restis baze burokrata.

Nuntempe, oni estas utiligonta la spertojn el la reformo de 1968 por moderna ekonomio. Estu kreataj pli favoraj kondiĉoj por la entreprenoj, kaj novajn entreprenformojn; plibonigataj estu la imposto-kaj salajrpag-sistemojn. Ene de racia konkurenco, la prezoj estu stimolataj. Ne plu estas tolerebla, ke la produktokostoj parte estas pli altaj ol la konsumprezoj.

Sufiĉe komplika estas la hungara impostosistemo. D-ro Gether klarigis plue la financajn intervenojn, la kontroladon de komerco, la investadreguligojn kaj ankaŭ la banksistemon. Kvankam antaŭe ekzistis nur unu banko, nun troviĝas pluraj.

La ŝanĝoj de la formoj de entreprendirektado donas pli grandan sendependecon de la registaro. La Entreprena Konsilio kaj la Ĝenerala Asembleo de ĉiuj dungitoj partoprenas ĉiujn gravajn decidojn. La entreprenoj kreskamaniere konkurencas unu kun la alia, kaj per tio eĉ eblas bankrotiĝoj, ĉar la ŝtato ne plu ĉie subvencias.

Post la prelego, D-ro Gether respondis plurajn demandojn dum vigla demandhorro. Evidentiĝis tute klare, ke la prelego vekis grandan intereson en la temo.

Nome de nia tuta membraro, ni proponu al D-ro Gether niajn gratulojn pro la por-li-tre-streĉa sed evidente sukcesplena prelegvojaĝo, kiu, inter aliaj efikoj, konatigis nian Fakgrupon en plej efika maniero.

Ni proponu dankojn al S-ro Fritz. W. Poppeck pro la originala germanlingva raporto, kaj al S-ro Braun pro la traduko de tiu teksto.



## ADMINISTRADO

La Ĝenerala Sekretario raportas:

LAŬLANDA RESUMO de nia membro-listo.

Tie ĉi ni raportas la familiajn nomojn kaj urbojn de nia Membroj kaj la nomojn de la tri organizaĵo-membroj en nia listo. Plena adreso estas livereblaj - al Membroj ! - sekve de peto al la centra sidejo. (Alĉono de irpk-o pro afranko estas petata, se eblas.)

Belgio:

Deseure, Zaventem; Maertens, Brugge; Rotsaert, Brugge;

Danlando:

Hagemann, København;

Francio:

Gilbert, Bar-le-Duc;

Okc.-Germanio:

Baber, Bad Homburg; Bormann, Hamburg; Braun, Bühl;  
Bühl, Stuttgart; Pachter, Sigmaringen-Jungnau;  
Schneider, Olpe; Voit, St Ingbert; Welling, Hoheneggelsen;  
Wiersch, Welzheim;

Hispanio:

Instituto Dex, Sevilla;

Hongkongo:

Lee, T.S., Hong Kong,

Hungario:

Ekon. Grupo de H.E.-A., Budapest; Gether, Budapest;

Irano:

Ahmad-Nia, Tehran;

Italio:

Argentino, Verona; Picasso, Vedano al Lambro;  
Polerani, Milano; Sartorio, Genova;

Japanio:

Yamakawa, Tokyo, (ŝanĝita adreso);

Jugoslavio:

Taleski, Skopje;

Kameruno:

Kboge Mbele, Douala;

Kanado:

Novaković, Delson;

Nederlando:

Derks, Sittard; Mee, Rotterdam; Mndk. Eld. Esp., Rotterdam;  
Rapley, Rotterdam; Seeseink, Dordrecht;

Suda-Koreio:

Lee, J.-K., Seoul; Lim, Seoul;

Svedio:

Luin, Tyresö;

Venezuelo:

Arocha, San Felipe; Blazquez, Caracas.



Aministrado, ĉaŭrigo el paĝo ok.

EVOLUO de la konto: Asocia Kapitalo, dum 1985.

Saldo komenca, je 1985-0-01		82,93 gld.
minus: malgajno el jaro 1984		226,04
		-----
nova saldo, negativa		( 143,11)
aldone, donacoj:		
Yamakawa	10,00	
Anonime	1 017,61	
Braun	160,00	
	-----	1 187,61
		-----
Saldo, je 1985-12-31		1 044,50 gld.
		=====

Bonvolu noti punkton 3.a de la 'tagordo' por la referendumo.

--oOo--

Aldone pri:

"Kiu faras kion  
en la Moza regiono."

Al ni venis, post ricevo de la recenzo pri la magazino de la Komerca Ĉambro de Bar-le-Duc, kaj sendepende de ĝi, laŭda dankesprimado pro 'gratulinda instigo', flanke de la Redakcio de Radio Vieno. Tiu Redakcio volas agnoski la rolon de IKEF en la iniciato, kaj gratulas ankaŭ nin.

En parolita aludo al la eldonita broŝuro, la Redakcio volis instigi aŭskultantojn aktive subteni, per gratulleteroj se ne eblas pli konkreta ago, tiun epokaran agon de la Komerca Ĉambro en Bar-le-Duc. La Redakcio opinias, ke la uzado de la internacia lingvo en tia magazino meritas publikan atenton, kaj provos trovi okazon recenzi ĝin en estonta elsendo.

(Teknika noto.

Legantoj eble ne jam scias, ke la frumatena elsendo de Radio Vieno nun komenciĝas je 05.30 h. kaj daŭras por 12 minutoj, dimanĉe matene.)

Enigma por la kontotenisto.

Al nia poŝtĉekkonto venis meze de marto sumon de dudek guldenoj, sed, pro eraro flanke de la poŝtbanko, ni ne ricevis klarigon pri la paginto. Al nia informpeto ni ricevis respondon, ke la kosto retrovi la nomon de la paginto kostus pli ol la ricevita sumo.

Ŝajnas, ke membro nia pagis tiun sumon, kaj versajne kiel kotizo. Se iu el vi faris, frue en marto, pagon rekta al nia konto kaj ne nun trovas kvitancon por la sumo, bonvolu helpi al ni solvi tiun ĉi enigmon.

Anticipan dankon!

---

Limdato por la proksima Novaĵletero estos la 15-a de junio, tie ĉi en Roterdamo.

Respondeca redaktoro kaj eldonanto de la Laŭokaza Novaĵletero estas  
S-ro Lawrence Mee.

La poŝtadreso de la Fakgrupo:

Fakgrupo Komerca,  
Postbus 25041,  
3001 HA Rotterdam,  
Nederlando.



REKLAMANONCOJ

por plantaritoj:

a) por Membroj de IKEF:  
unu anonceto ĝis inkluzive  
de ses linioj: senpage;  
por pli longaj anoncetoj:  
po 1 respondkupono, (irpk),  
por ĉiuj komenciĝantaj ses  
linioj.  
Ĉiam unuope mendendaj.

b) por ne-Membroj de IKEF:  
po 1 irpk por ĉiu linio, aŭ  
por ĉiuj tri milimetroj de  
longeco, enkadrigita,  
sed kun minimumo de ok  
irpk-oj. Ĉiam antaŭpagita.  
Por anoncoj je pli granda  
larĝeco ol unu kolumno:  
laŭ aparta interkonsento.  
Ĉiam: tri aperoj de la sama  
anonco en sinsekvaj kalendaroj  
por la prezo de du aperoj.

Kurzo: 1 irpk = 0,90 gld.

REKLAMANONCOJ

Kvalifikita ĉefvendisto en  
Togolando deziras reprezenti  
firmaojn; laboros komisie.  
S-ro M.B.A. Agbenadon, CEG  
de Zalivo, B.P. 134,  
Aneho, Togolando.

La Baza Kurso en Esperanto,  
de Audrey Childs-Mee;  
la plej efika metodo instrui  
kursanaron. Eldoninto:  
Mondk. Eld. Esperantista,  
P.O. kesto 25041, Rotterdam.

Reklami estas informi;  
ju pli vi informas,  
des pli vi vendos.  
Uzu la senkoston servon de  
via propra komunikilo:  
La Laŭokaza Novaĵletero.

REKLAMANONCOJ

La Stelo.

La valida kurzo por la Stelo  
nunatempe en Nederlando  
estas: 1.00 guldeno egalas  
al 1.300 Steloj.  
Petu kurzojn por aliaj lan-  
doj de Mondk. Eld. Esperant-  
ista, Postbus 25041,  
3001 HA Rotterdam,  
Nederlando.

Pensu pri  
komerca Eldonejo  
Esperantista  
por viaj komercaj bezonaĵoj.  
P.O. kesto 25041,  
3001 HA Rotterdam, Nederl.

Tiu  
ĉi  
spaco  
estas  
rezervita  
por vi!

Pri pagoj al ni.

IKEF ĝis nun ne havas apartan bankril-  
aton, sed utiligas por ĉiuj financaj trak-  
taĵoj konton en la kontaro de Mondkomerca  
Eldonejo Esperantista, ĉe la adreso:

P.O. kesto (Postbus) 25041,  
3001 HA Rotterdam, Nederlando.

Tiu Eldonejo tenas poŝtĉekkonton, numero  
361 47 95 ĉe la nederlanda Poŝtbanko,  
(antaŭe: nederlanda poŝtĉekinstanco).

Membroj de IKEF pagas jarkotizon en la  
sumo de dudek guldenoj, valida por kalen-  
dara jaro. Cele al realtiva malaltigo de  
kostoj kaj laboroj, ni ĉiam konsilas al  
pago por kelkaj jaroj en anticipo. Ant-  
cipa pago por dudek jaroj aŭtomate prov-  
izas membrecon dumviva.

La du plej rekomendindaj metodoj fari  
pagon al ni estas aŭ per rekta transpago  
al la poŝtĉekkonto de M.E.E., el propra  
poŝtĉekkonto via, aŭ per aĉeto de inter-  
nacia poŝtmandato ĉe la poŝtoŭficejo kaj  
citante la nomon de la Eldonejo. En  
ambaŭ kazoj, bonvolu aldoni la mesaĝon:  
'por IKEF'.

Ni provas starigi trian eblecon, tiu de  
rekta pago al Peranto en via lando; ĝis

nun ni havas konsenton en principo pri  
Okc.-Germanio kaj pri Italio, sed la det-  
aloj estas ankoraŭ prilaborataj. Inter-  
tempe, ni serĉas sinanoncojn de membroj  
pretaj esti Perantoj en aliaj landoj.

Foje oni volas fari pagon per uzado de  
internaciaj respondkuponoj. Tio estas  
realtive multekosta metodo por la paganto,  
sed ĝi estas tute akceptebla kaj malmul-  
tekosta metodo por ni. La kosto de jarkot-  
izo estas dudek tri irpk-oj.

Alia praktika metodo estas la aĉeto de  
monbiletoj nederlandaj, kaj ilin sendi al  
ni per registrita poŝto. Iu restanta  
sumo post enkasigo estos konservita por  
vi en persona konto.

Alia tre kosta metodo estas la uzado de  
persona ĉeko via, al la persona nomo de  
S-ro L. Mee kaj kun la aldono de kvar kaj  
duono guldenoj, cele al duonigo por ni de  
la ne-eviteblaj kostoj de enkasigo.

Lasta ebleco estas fari pagon tra Univ-  
ersala Esperanto-Asocio, ankaŭ en Rotter-  
damo, por tiuj el vi kiuj tenas konton  
tie. Faru mencion de la nomo, Internacia  
Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo, kaj UEA  
aŭtomate elpagos la sumon al ni.



## La vojo antaŭen.

Pardonpetante al la eldonanto de revuo *Laŭte!* pro la mizera aspekto de la represoj de artikolo el tiu revuo en la kurantan kajeron de la *Laŭokaza Novajletero*, la respondeculo pri tiu lasta revuo nun refaras la represon je propra kosto, kaj sendas ekzempleron de ĝi al ĉiu ricevinto de tiu *Laŭokaza Novajletero*.

Represo de la artikolo estas invitita kie ajn, sen bezono de aparta peto por permeso.

Pliaj ekzempleroj de tiu ĉi folio estas haveblaj ĉe la nuna eldonanto, ĉe adreso :

Postbus 25041,  
3001 HA Rotterdam,  
Nederlando,

sed en tiaj kazoj ni petas la afablecon de repago de la sendokostoj kaj de kontribuo al la preskostoj.

Komentoj pri la enhavo de la artikolo estus bonvenigitaj de la Redaktoro de la *Laŭokaza Novajletero*, ĉe la provizora adreso:

Fakgrupo Komerca,  
Hornisgrindestrasse 8,  
7580 Bühl 16,  
Okc.-Germanio.

Lawrence Mee,  
eldonanto.

Rotterdam,  
1986-10-04.



## Al la Esperanto-Movado:

Foje valoras retrovi spurojn de pensoj aŭ agadoj malnovaj.

Kiam, lastatempe, hazarde venis al atento artikolon de antaŭ kvin jaroj, ni legis ĝin kun intereso, kaj konkludis, ke ĝi meritas pli vastan publikon.

Jen ĝi.

REPRESITA el revuo *Laŭte!* por septembro-oktobro, 1981; eldonita de: Cercle espérantiste de l'Agénais, Laroque Timbaut, Francio.

### La vojo antaŭen.

Mi estas obsedata per penso, ke, se iam Esperanto atingos akcepton pere de la amasoj, ĝi tiam tian akcepton atingos ĉar, kaj nure ĉar, homoj grandamase konstatos, ke per la internacia lingvo ili povas ĝui materian 'profiton', kiun ili ne povas ĝui per iu alia rimedo. (Mi pensu nur pri la disvastigo de la angla lingvo por konstati, kion povas fari la profitmotivo.)

Ne necesas diskuti la fakton, ke ni Esperantistoj ĝuas spiritan 'profiton' per kaj pro nia subteno de la i.l., nek ke ni ĉiuj forte deziras dividi tiun spiritan profiton inter ĉiuj homoj en la mondo. Sed tutevidente tiu spirita profito ne sufiĉas; 99.8 procento de la homaro ne parolas Esperanton, malgraŭ la naŭdek jaroj dum kiuj ĝi jam ekzistas.

Ĉiu leganto de tiuj ĉi vortoj bone scias, ke Esperanto, kvankam ne estante tute perfekta lingvo se ni aplikas al ĝi la rigorajn kontrolojn de lingvistikoj, tamen estas perfekta komunikilo inter homoj, ĉu ili interkomunikas parole, skribe, morse aŭ per iu alia metodo. Esperanto estas bonega lingvo, tute taŭga por literaturo, ĉu proza ĉu poezia, por sciencaj malkovroj, por interŝtataj traktadoj kaj por politikaj celoj ĝenerale, por kantado

kaj ĉiuj aliaj formoj de distraĵo, por edukado de infanoj kaj plenaĝuloj, ĉu ĝenerala ĉu faka, por intersaĝo de opinioj pri filozofio, religio, arto kaj interhomaj rilatoj ĝenerale, kaj por komerco en ĉiuj ĝiaj multegaj formoj.

El tiu longa listo, la nura rubriko pri kiu ni devas konstati, ke Esperanto ne estas uzata, (aŭ estas tre, tre malofte uzata), estas la lasta, en komercaj rilatoj. Strange, ĉu ne? ke la plej rikoltopotenca kampo estas precize tiu, kiun ni ne plugas!

Tradicie, verŝajne, la vorto 'profito' estas tabua vorto inter Esperantistoj. Dum la jaroj, pluraj generacioj de Esperantistoj sindone oferadas laboron, ofte sufiĉe streĉan laboron, tempon, ofte sufiĉe longdaŭran tempon, kaj monon, ofte sufiĉe pene akiritan monon, al la disvastigo de nia kara ideo, ke homoj povu interkompreniĝi senĝene trans la barilo de malsimilaj ĉiutagaj lingvoj, kaj per tiu facila interkomprenado akceli la alvenon de paco kun samtempa egaligo de vivriĉeco en ĉiu angulo de nia, mirinde riĉa, mondo.

Ĉu mi estas tro severa, se mi asertas, ke tiu sindonado estis kaj estas farata kondiĉe, ke per Esperanto neniu persono spertu materian profiton? La nura alia ebla konkludo estas, ke Esperantistoj estas aparta speco de homo, apartigita disde la grandega plimulto de la aliaj membroj de la homaro per nekapablo kompreni la plej simplan regulon de ekonomiko, ke laboro, (en la plej vasta senco de la vorto), devas esti rekompencata per akiro de la rezultato de (almenaŭ parto de) la laboro de alia homo aŭ aliaj homoj. Tiun konkludon mi ne trovas konvinka.

Tute povas esti, tamen, ke Esperantistoj ĝenerale simple forgesas apliki al siaj laboroj por la i.l. la ĉiutagajn spertojn akiritajn per pangajna laboro por entrepreno aŭ instanco. Ĉu



inter miaj legantoj estas iu persono, kiu ne alkutimiĝis jam al enspezo kaj elspezo de mono, al konservado de parto de la enspezo en iu tempo por ebligi ĝuadon de varo aŭ servo en alia tempo, al daŭra pliefikigo de la rezultoj de homa laboro per sciencaj kaj teknikaj malkovroj fare de esploristoj en kampoj en kiuj komerco sekvas la kutimajn vojojn; mallonge, al la grava rolo de profito?

Bedaŭrinda rezulto de tiu forgesemo de Esperantistoj estas, ke, ĉaro ofte, la atingajoj de tiuj Londonaj oferintoj malaperas sen spuro, foje post mallonga tempo. Neniu povus nun kalkuli la nombron de lokaj E.-societoj, kiuj siatempe floris sed poste malaperis, aŭ de revuetoj kiuj siatempe promesis gravan estontecon sed efektive vivis nur mallonge, aŭ de gravaj libroj, precipe fakvortaroj, kiuj aperis en nur la unua eldono, neniam reviziita nek korektita. En la plimulto de tiuj kazoj, la tempo-daŭro de la societo aŭ revueto estas ligita al la vivo de unu persono, kaj la malapero koincidis aŭ kun la morto de tiu persono aŭ kun la eluzo de la fordonebla kvanto de la mono de tiu persono. Se ni aplikas al ĉiuj tiuj kazoj la normojn de ekonomiko, ni ne povas eviti la konkludon, ke la koncernata agado estis farata en maniero kiu ne certigis la kreon de la profito necesa por certigi la daŭrigadon de la entreprenado.

Ĉi tute, en kelkaj, eble multaj, kazoj, la intenco de la iniciatinto vere estis, ke la entreprenado neniel spertu profiton; en aliaj kazoj, la iniciatinto eble ne havis apartan sintenon, ĉi pro ĉu kontraŭ profito, sed simple neniel pensis pri ĝi, ne sufiĉe lerte faris la bazajn kalkulojn, kaj baldaŭ trovis, ke daŭrigo de la entreprenado kostas ne-elteneblan elverŝon de propra mono.

Estas fakto preter dubo, tamen ke la plenumo de ĉiuj taskoj kaŭzas elspezojn, en la plej

simplo kazo de laboro, en aliaj kazoj de mono per kiu akiri la rezultato(j)n de la laboro de alia homo aŭ aliaj homoj.

Se iu tasko estas ade ripetita, tiu poa elspezo devas esti kovrita per enspezo, en la plej simpla kazo per kontentigo pro la rezulto de la laboro, en aliaj kazoj per mono aŭ valorajo en iu formo. Pli grave, en la kazoj kiam plenumo de la tasko postulas la uzadon de ekipaĵo en iu formo, la kvanto per kiu la enspezo 'kovras' la elspezojn devas esti sufiĉe granda por ke, post plimallonga tempo-daŭro, sufiĉe da mono estas konservata por ebligi renovigon de la ekipaĵo. Enspezo de tiu 'plusa' kvanto de mono ne estas ago preni profiton el la entreprenado; la kosto de eluzado de la ekipaĵo estas ordinara parto de la kosto plenumi la taskon. La iompostioma konservado de tiuj plusoj estas nepre prudenta ago por malebligi la ĉesigon de la entreprenado en la tago kiam la ekipaĵo ĉesas funkcii, aŭ ne plu povas plenumi la taskon.

Por ebligi al la entreprenado vere flori necesas, ne nur, ke la kosto estas kovriataj per la elspezoj, (laŭ la ĵusa klarigo), sed ankaŭ, ke la 'plusa' kvanto de mono sufiĉas por ebligi akiron de plusa aŭ plukapabla ekipaĵo. En tia kazo, ne eblas ne rekoni tiun 'pluson' kiel profiton.

Ni revenas, do, al nia komencpunkto. Ni ĉiuj deziras, ke Esperanto atingu akcepton flanke de la mondo ĝenerale; necesa baza kondiĉo estas, ke E.-societoj, -instancoj kaj -entreprenoj floru vaste tra la mondo; ligita kondiĉo estas, ke nunaj kaj estontaj Esperantistoj subtenu tiujn entreprenojn kiuj uzas la internacian lingvon kaj faras profiton. Ne-evitebla konkludo estas, ke la sinteno de la plimulto de ni, ke la vorto 'profito' estas tabua vorto, estas erara sinteno. La ebleco konstati komercan gajnon ligitan kun uzado de la i.l. estas nepre antaŭkondiĉo por iu serioza provo



akceptigi Eo-n generale en la mondo.

Eĉ se ni volas pensi, ke per akiro de kapablo en la internacia lingvo ordinara homo tiel ŝanĝus sian sintenon, ke ŝili libervole forlasus la uzon de la angla lingvo, (per kiu ŝili ne-eviteble rekonas gradan plialtiĝon en la propra vivnivelo, kadzitan per seĝa apliko de la profito normale ligita kun komerca interŝanĝo de varo aŭ varoj), kaj komencas fidi je la efikeco de neŭtrala interkompfenigilo en kampo en kiu ĝi ĝis nun neniel havis ŝancon pruvi tiun efikecon, ni devas agnoski, ke tiu volo estas nenio alia ol revo, por ne diri mem-trompo.

Kaj la afero nun urĝas. Ĉiutage ni legas pri nova kresko de internaciaj komercaj rilatoj; racie ni devas agnoski, ke la disvastigo de la usona dialekto de la angla lingvo ĉiutage akiras pli kaj pli da forto, dum la disvastigo de la vera internacia lingvo stagnas. Estas jam mal-facile resti optimisma, ke Eo gajnos en la konkurso; se nia lingvo malvenkos en la komercaj rilatoj, restas malgranda ŝanco akceptigi ĝin en aliaj medioj.

Ĝis maksimume, niaj fortoj devas kunligiĝi nun en streboj plivastigi la uzon de Eo en komercaj rilatoj. Taŭga komenc-punkto -- ĉar ni devas pensi pri agado kiu daŭros pli ol nur kelkajn tagnoktojn -- estas en la kontotenado en lokaj societoj tiel, ke ĉiu membro baldaŭ kutimiĝos al la uzo de la fakaj, sed tamen ordinaraj, vortoj necesaj en komercaj rilatoj. Sed alki-imiĝi al la 'komercaj' vortoj ne sufiĉas; Esperantistoj devas agnoski, ke en ĉiu ago fari aĉeton, ĉu de vivnecesaĵo, de alia varo aŭ de servo farota de alia persono, la aĉetanto donas al la liveranto iom da profito. Ni devas konscie serĉi metodojn doni tiun profiton al persono aŭ instanco kiu uzas la internacian lingvon; per ĉiu tia profito ni plifortigos nian propran intereson.

1m

Aldona noto, okaze de la nuna represo.

Jam dum du jaroj ekzistas faka asocio dediĉita al provado akceptigi la internacian lingvon en la ligitajn kampojn de komerco kaj ekonomiko.

Tiu asocio estas :

## Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo

konate per la siglo, IKEF.

IKEF jam havas membrojn en dek ok landoj, kun Perantoj en kvin el ili. Fondkunveno okazis dum la Universala Kongreso, 1985, en Aŭgsburgo, kaj unu jaron poste, IKEF okazigis ne-formalan kun-venon dum la UK en Pekino.

La organo de IKEF estas la

## Laŭokaza Novaĵletero.

Tiu organo aperas ses-foje en la jaro, kaj aperigas artikolojn de Membroj. Membroj estas ebligataj aperigi reklamanoncojn en la LN-o kaj en aliaj manieroj konatigi komerceblecojn al la ceteraj Membroj kaj aliaj legantoj. La LN-o regule raportas pri la faka terminologia laboro kiu estas la ĉefa agadkampo de IKEF, kaj atentigas pri interŝanĝado de ideoj inter la Membroj.

Varbado de novaj Membroj okazas inter Esperantistoj kiuj havas rekte aŭ ne-rekte rilatojn kun komercaj negocoj aŭ la kampo de ekonomiko. Aparte serĉataj estas studentoj en la rilatataj kampoj. Membroj pagas modestan kotizon de kvarcent belgaj frankoj jare; eblas fariĝi Dumviva Membro.

Paru informpeton al la Kasisto :

S-ro R. Rotsaert,  
Visspaanstraat 97,  
8000 Brugge, Belgio.